# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-50 sendita el Budapeŝto la17an de novembro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# EKO jubileas refoje



En 2020 ni kreis sesdek komunikojn, do neniu miraklo, ke ni nun atignis 50. Pluiras la pandemio kaj la bezono por virtualeco. Ĉi-foje ni arigis multajn informojn pri eventoj en 2022.

La nombro de komunikoj depost la fondo en 2013 estas 340, sumo kiu kreskos ankoraŭ.

**Bondeziru al la servo de UEA per EKO plian utilon! Sube rekomendoj por helpi al ni!**

## Praktikaj konsiloj por kontribuantoj al EKO

- Laŭeble liveru viajn korpotekstojn jam en la litertipo 'Arial 12'.
- Por supersignoj, nepre uzu la universalan sistemon 'Unikodo'.
- Limigu vin al 300-400 vortoj
- Zorgu pri enmeto de bazaj informoj gravaj por internacia publiko.
- Proponu nelongan okulfrapan titolon!
- Laŭeble liveru unikajn tekstojn. Facilas krei tekstajn alternativojn.
- Uzu linio-rompojn: Evitu uzon de 'senrompaj spacoj (angle: no-break spaces):
- Evitu laŭeble la alinean interspacon 'Auto'. Prefere nule antaŭe kaj 6pt poste.

Antaŭdankon pro via kunlaboro. EKO funkcias plene per volontula laborado.

# Ni rigardu antaŭen al 2022!

Nova jaro – novaj ebloj. Jen servo de EKO por helpi al vi decidi. Por pli kompleta bildo rigardu la servon de UEA: 'Eventa Servo'. Ni listigas la ricevitajn proponojn en kronologia ordo.

## *Skoltoj en Italio aprile*

Skolta Esperanto-Ligo (SEL) invitas al internacia geskolta tendareto SKOLTO 2022.

La dato estas 11-18 de aprilo 2022. La loko estas en Italio, ene de Nacia Parko, apud la urbeto Ascea (sudoriente de Napoli).. En la sama urbeto okazis en 2018 Internacia Junulara Festivalo de la Itala Esperanto-Junularo (IEJ). Bonvolu legi la informojn en la retejo skolta.org. Ili estas daure kompletigataj kaj ĝisdatigataj. Ni atentigas vin ke la nombro de la partoprenontoj estas limigita. Nur la unuaj 100 aliĝoj estos akceptataj, kaj la unua parto de la kotizo devas esti pagita antaŭ la fino de novembro.

## *IFEF-Kongreso maje en Beroun, Ĉeĥio*




La 73-a IFEF-kongreso okazos en Ĉeĥio. en la urbo Beroun, proksime de Prago.
Datoj de la 6-a ĝis la 11-a de majo 2022.
Postkongreso okazos de la 12-a ĝis la 15-a de majo. (vizitoj planitaj : Pardubice, Litomyšl, Svitavy, Hradec Králové, Třebechovice).
Konstanta adreso de la kongreso : http://ifef.free.fr/IFK2022

## *Baltiaj tagoj en julio en la litova havenurbo Klaipeda*

Meze de julio 2022 la Litovia havenurbo Klajpedo akceptos centojn da diverslandaj partoprenantoj de la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56). Konatiĝu kun ĉi tiu malnova ĉemara urbo per la artikolo de la Vilna ĵurnalisto Vytautas Šilas, publikigita en la aŭtuna eldono de "La Ondo de Esperanto" https://sezonoj.ru/2021/10/bet-103/

"La Ondo de Esperanto" komencas prezenti la personojn, kiuj kontribuos al la programo de la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), kiuj okazos la 9-17 de julio 2022 en Klaipėda (Litovio). La unua prezentato estas profesoro Aloyzas Gudavičius el Šiauliai, kiu en BET-56 gvidos la kurson de la litovaj lingvo kaj kulturo https://sezonoj.ru/2021/10/bet-104/

En la 56aj Baltiaj Esperanto Tagoj (BET-56), kiuj okazos la 9-17an de julio 2022 en lahavenurbo Klaipėda (Litovio), prof. Koutny prezentos kvin prelegojn.

1. **Esperanto inter la naturaj lingvoj** traktas diferencojn inter planitaj kaj naturaj lingvoj, poste prezentas la esperantajn sonsistemon, gramatikon kaj leksikon en komparo kun etnaj lingvoj surbaze de granda datumbazo, esploras, kiugrade Esperanto estas averaĝa kaj eŭropa lingvo.

2. **Etapoj de la evoluo de Esperanto** prezentas la evoluon de la lingvo Esperanto en kvin etapoj kun ĝiaj gravaj dokumentoj.
3. **La obstinaj radikoj** traktas la problemon de vortfarado kaj analizas la problemon ĉu ekzistas radikkaraktero en Esperanto.
4. **Verboj en la centro** traktas la rolon de verboj (sintakse kaj semantike).
5. **Esperanta vortoprovizo kaj ĝia evoluo** traktas la rilatojn en la vortoprovizo kaj analizas la vojon alpreni novajn radikojn.

BET-56 havas auspicion de la Universala Esperanto-Asocio. Alta Protektanto de BET-56 estas la urbestro de Klaipėda Vytautas GRUBLIAUSKAS. BET-56 havas ĉiuflankan subtenon kaj helpon de urbaj instancoj de Klaipėda kaj ankaŭ de la tutlandaj ŝtataj instancoj de Litovio. Partoprenantoj de BET-56 havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. Reta aliĝilo al BET-56 estas trovebla ĉi-tie: https://mallonge.net/gl

Ni atendas ne malpli ol 500 partoprenantojn el 30-40 landoj. Konstante aktualigataj informoj pri BET-56 ĉe :http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56

Listo de jamaj aliĝintoj al BET-56 estas ĉi-tie:
http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=9

Videofilmeto pri Litovio en Esperanto estas spektebla ĉi-tie:
http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=5

## *Amikoj en Kaliningrado - julie*

Katerina Arbekova (la ĉeforganizanto) informas, ke Renkontiĝo de Amikoj - 16 (RA-16) okazos en la urbo Kaliningrado (Kaliningrada regiono, Rusio)17-25 julio 2022.

## *Itala kongreso en aŭgusto en Brecsia*

Itala Esperanto-Federacio organizos sian 89-an kongreson ontjare de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto en la urbo Breŝho. (Brescia). Por ke vi povu antaŭĝui ĝin vi povas spekti la filmon de la turisma oficejo en Esperanto. Kaj poste ne forgesu viziti la ttt-paghon kaj aliĝi! https://kongreso.esperanto.it/89/it/




Brecsia kuŝas inter Bergamo, Verona, lago Garda, Cremona kaj Parma. Bergamo akcpetas nekostajn flugojn el multaj landoj.

# Eŭropo pripensas sin mem – ebloj por ni

Paralele al la oficiala EU-konferenco pri la estonteco okazas simila konferenco de la EU-parlamenta frakcio "renew Europe” (renovigi Eŭropon), kunlabore kun Democratic Society, https://www.demsoc.org/

Eblas peti partopreni sur https://engage.reneweuropegroup.eu/processes/future-of-europe/f/6/ Oni repagos kostojn por vojaĝoj k.s.

Supozeble ne necesas senfine kredi je la celoj de la frakcio, kie membras i.a. liberalaj partioj. Aliflanke indas ke ni Esperanto-parolantoj levu nian voĉon pri lingvo-temoj ankaŭ tie. Jen gravaj datoj por la sekvo:

Du virtulaj vesperaj sesioj: Marde 7 & Ĵaŭde 9 decembro 2021 (1830-2030 CET)
Semajnfine: 15 & 16 Januaro 2022 en pluraj urboj ĉirkaŭ Eŭropo
Semajnfine: 12 & 13 Februaro 2022 en Strasbourg"
Limdato por aliĝpeto estas la **30a de novembro**.

# Serbio – lando renaskiĝinta

La Eŭropa Komisiono de UEA laboregas konstrui fortan reton de retkursoj pri Esperanto, por rekrei la miraklon de tiu simila kurso en Latinameriko. La multlingvecon de Eŭropo ne faciligas la taskon, sed la nombro de kunlaorantaj landoj daŭre kreskas. Nun aldonu la nove revigliĝintan landon Serbio. Jen ilia versio de afiŝo uzebla por konigi la kursan atingon, por ke kresku la nombro de novaj esperantistoj tie.




**Alkroĉaĵo: ero de Nina Danylyuk por AMO 78**

========= vortoj: 885 =========


Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.


Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la 17a aŭgusto 2021 (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ilei

**Helpantoj:**
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François Lo Jacomo

**ENHAVO**

- EKO 50 jam atingita
- Eventoj tra 2022 – Ĉeĥio, Italio kaj pliaj
- Eŭropo eterna meditas
- Serbio aktivas